

la nica literatura



revuo

Cefredaktoro : G. Waringhien

Redakta Komitato :
Roger Bernard, J. Régulo Pérez, Tomàs Pumpri
Reto Rossetti, Ivo Rotkvič, Raymond Schwartz

Redakcio :
7, avenue Gourdault, Choisy-le-Roi (Seine), Francujo.

Administracio :
5, boulevard Stalingrad, Nice (A.-M.), Francujo.

Poŝta Konto :
R. Fiquet n° 2259-98 Marseille

Dumonata Revuo
Bimestrielle

Dua Jaro. Numero 1. (7)
Septembro - Oktobro 1956

E N Ĥ A U O

	Paĝoj
K. KALOCSAY	Kalendaro (fino) 1
X. X. X.	Ankoraŭ unu alian! 7
W. AULD	La Urbo de Terura Nokto 8
R. BERNARD	Funebra Parolado pri la Tri Koboldoj. (fino) 18
J. THIERRY	Unu Internacia Problemo. La Mortigisto 25
E. RODE	nur malmultaj mortin- toj... 29 (trad. G. Thorstain)
C.C. GUGLIELMINETTI .	Recenzo : Kontralte 35

Repreco malpermesata.

Ne presitaj manuskriptoj ne estas resendataj.

La Redakcio rezervas al si la rajton konfirmigi la tekstojn al la Zamenhofa lingvo-uzado.

Bonvolu averti nin pri eventualaj eraroj en adreso kaj afranko.

Sendante vian mendon, bonvolu indiki, ĉu ĝi estas abono aŭ reabono kaj, en kazo de nova abono, de kiam ĝi devas komenciĝi.

GLOSOJ

Ni konsideru nur la vortojn, kiuj mankas en la kvara eldono de la Plena vortaro de S A T.

apreci. Kompetente taksu la artan valoron de io.

egocentra. Rigerdanta sian memon, kiel la centron de ĉio.

filandro. Subtila fadeno ŝveban-ta en aero, somerfina.

hida. Horore malbelega.

Karmanjolo. Fama kanzono de la Senkulotuloj.

kredenci. Pormeti (trinkajon kip.) al iu.

langvoro. Malstreĉiĝo de korpaj kaj animaj fortoj.

taverno. Drinkejo.

Koloman KALOCSAY

K A L E N D A R O

Fino

41. — Tulipo

Tulipo, damo pimpa, en kostumo
Verda kaj ruĝa, vi por amindumo
Galanta logas, sed mi vin adorus,
Se havus vi animon el parfumo.

42. — La 14. de Julio

Falis Bastille, la servut-simbolo!
Sur la ruinoj dancas la popolo.
De tiam jar' al jaro eĥas veke
La vokon de l' triumfa Karmanjolo.

43. — Leontodo

Ej, leontod', ludilo flok-disŝuta,
Vi estas konkeranto liliputa!
La tutan kampon volas vi avide
Invadi per taĉmento paraŝuta.

44. — Fulmotondro

Plumb-nubo al soifa ter', kredence,
Grandgute plaŭdan pluvon verŝas dense.
Ĉin fulmoj urĝas: "Haste, he! Atendas
La ĉielarko jam senpacience!"

45. — Aŭgusto

De varmo ŝvitas frunt', anhelas brusto:
Ardegas la bakforno de Aŭgusto.
La suno, la sukeraĵisto sorĉa,
Bakas frandaĵojn de aroma gusto.

46. — Tremolo

Kun tremo trista kaj langvoro mola
Sur akvon klinas sin branĉar' tremola,
Kaj zumas al kompata rivereto
Lamenton en minora mi bemola.

47. — Rezedoj

Vespere, el la flortapiŝo beda,
Alfluas tajde la parfum' rezeda,
Acerbe-dolĉa, lula, sorĉe loga,
Langvora, peza, prema, jam obseda.

48. — Stelofalo

" Se stelo falas, iun glutas tombo."
Tra l' nokto de Aŭgusto en la pompo
De grandioza artfajraĵo sparkas
La steloj defalantaj. Hekatombo!

49. — Lampiroj

En nokto min albrilas dum kamp-iro
La fee glimaj lumoj de lampiro.
Pigmeoj eble en la herb' kongresas
Ĉe etaj torĉoj, flustras en konspiro.

50. — Fojnodoro

Parfumdeliroj de mortantaj floroj,
Lastvibre voluptemaj velklangvoroj,
Kaj varma aromo de jusmelka lakto
Tra l' nokt' alfluas nun en fojnodoroj.

51. — Kukolo

Kukolo, birdo de aŭgura voko!
Kiom da jaroj havas vi en stoko
Por mi, nu nombru! 1, 2, 3... 5... 7...
10... 15... 20... Dankon pro l' mensogo!

52. — Septembro

Septembro, granda majstro de la farboj,
La monotonan verdon de la arboj
Transpentras flava, ruĝa, ore-bruna.
La vento gloras ĝin per zumaj harpoj.

53. — Emocio

Ne estas tiel granda sensacio,
Tamen per elektruma emocio
Min trafas la mesaĝ' parfum-portata:
" La duan fojon floras akacio! "

54. — La Heredo

Somer', patrino riĉa, iĝis predo
De mort' velkiga. Kaj ni, ĉe l' bankedo
Funebra, plezuregas pri la fruktoj,
Kiel senkoraj idoj pri heredo.

55. — Malfrua Eho

Jam kie estas la printempaj triloj
De merlo-flutoj kaj fringel-fajfiloj?
Melankolie al la Maj-muziko
Nun ehas la septembra flor' de griloj.

56. — Filandroj

Dum gaje sonas kantoj vinrikoltaj,
En la aero la aŭtunheroldaj
Filandroj flirtas, grizaj fein-haroj.
Ho ve! jam la feinoj iĝis oldaj.

57. — Cikorio

Kurante tra la kamp' en histerio
Skeletajn brakojn svingas cikorio.
Kion perditan serĉas ŝi freneze?
Ho ne demandu! Trista historio.

58. — Oktobro

El nubo morna kiel la noktombro
Aspergas nin per splena pluv' Oktobro.
Mediti vokas ĉambro. Sed en keloj
Jam bolas most', por savi nin de sobro.

59. — Maljunulin-somero

Sunbrilo ree, kvazaŭ por almozo!
Kiel virino en lasciva pozo
Sopire la Natur' ankoraŭ laste
Ekardas en panik' de pordoŝloso.

60. — La Gruoj

Formigre gruoj tranĉas la aeron
Kaj krias: "Venu kun ni en someron!"
Mi adiaŭe levas miajn brakojn,
Formante, kiel ili, V-literon.

61. — Purigado

Purigas la Aŭtuno en vestiblo,
Foliojn rastas kun moroza siblo,
La paĝojn de valora, granda, kara,
De ŝiaj buboj disŝirita, libro.

62. — Prunelarbeto

Kovrinte sian velkon per la tuloj
De prujno, ŝi ridetas al vaguloj,
Siajn acerbajn kisojn proponante
Per la koketa blu' de cent okuloj.

63. — Novembro

La laman lumon trenas tra la valo
La kripla suno de fantoma palo.
Arb' nuda tremas en la tranĉa vento,
Sopiras je la ŝirm' de blanka ŝalo.

64. — La 2. de Novembro

Ho trista tag' de kolektitaj ĝemoj!
La homoj, por sin savi de korpremoj,
Hororon hidan de la tomboj kovras
Per la acerba pomp' de krizantemoj.

65. — La 7. de Novembro

Amas' ribela sturmas por la gloro
Triumfa de Libero kaj Laboro.
Fendante la obskuron de jarmiloj
Per ruĝaj salvoj fajras la Aŭroro.

66. — Novembra Humoro

Adventaj ventoj frido-spire siblas,
La ploraj nuboj plumban pluvon kribras,
La mondo mornas en melankolio,
La meĉo de l' esper' apenaŭ vibras.

67. — Pasero

Hirundoj nin forlasis sen skrupulo.
Vi, pasereto, restis fidelulo.
En frosto vi malsate ĉirkaŭsaltas
Ĉevalon, ĝin petante pri manĝbulo.

68. — Kornikoj

Super la kampoj de dezerta vak'
Kornikoj flugas en funebra jak'.
"Oj! kio finas ĉion belan, bonan!"
Suspiras mi. Respondas ili: "Kraak'!"

69. — Novembra Suspiro

Nenio estas, vere, pli dolora,
Ol rememori, pri feliĉo fora
En la mizer': pri Majo en Novembro
Senflora, senbirdkanta, senkolora.

70. — Decembro

Maljuna av', li portas, neĝo-ŝuta,
Kovrilon blankan al la branĉo nuda,
Al la infanoj sledon, glitumilojn
Kaj neĝopilkojn por batalo luda.

71. — Vintraj Floroj

He, blankbarbul', vi iĝis jam moroza !
Vi vipas nin per vento furioza.
Jen, tamen — floroj, sur knabinvizaĝo,
Kiun la freŝa frosto pinĉis roza.

72. — La 6. de Decembro

Nik-Nikolao, kun la barbo-ava,
Vi donas el tornistro riĉenhava
El vergoj vipon al la knab' malica,
Abundan bonon al la bubo brava.

73. — La 15. de Decembro

Naskiĝis en ĉi tiu tag' la koro
Sopira venki en decida horo :
La kuracisto de l'homaro muta,
Kaj en la blinda mond' okuldoktoro.

74. — La Gnomoj

Neĝas, neĝegas, preskaŭ dronas domoj.
La frostajn flokojn kirlas vento-gnomoj
Kaj krias moke : " Hejho ! Ne kuradu
Zigzage tiom, sidu hejme, homoj ! "

75. — La Spitantoj

Kiel de spir' de morto, tremas membro.
Sternita la tombtolo de Decembro.
" Eĉ sub la neĝo oni povas verdi " —
Admonas la abio, pino, cembro.

76. — Kristnasko

Nun ĉiun domon faras fe-palaco
Plezur' de dono-preno de donaco.
De du jarmiloj unu nokto jare
Estas la via, Paco, Paco, Paco !

77. — Silvestro

La jar' maljuna, morna muzikestro,
Neĝŝtormojn blekis per la blovorkestro,
Sed gaje, kun tintila ĉap' surkape,
Li mortas nun, en nokto de Silvestro.

**Feliĉan Novan Jaron ! Jar' feliĉa,
Demandas mi kun timo superstiĉa,
Ĉis kiam, diru do, simile al vi,
Mi povos morti, ĉiam reviviĝa ?**

ANKORAŬ UNU ALIAN !

Aŭtomobilisto radumas po cent kilometroj en horo, trafas arbon, kaj retrovas sin, iom zigzagitan, antaŭ Sankta Petro, kiu demandas : " Kion vi deziras ? ". Kaj la alia, kun sovaĝa mieno : " Alkonduku Sanktan Kristoforon, ke mi diru al li mian opinion ! "

Ŝi (ĉe spiritisma tablo). Kara edzo mia, ĉu vi nun estas feliĉa ?

Lia voĉo. Jes.

Ŝi. Pli, ol kiam vi vivis kun mi ?

Lia voĉo. Jes.

Ŝi. Kaj kion vi faras, en la paradizo ?

Lia voĉo. Sed mi ne estas en la paradizo, mi estas en la infero.

Epitafoj de orserĉistoj

1

Al Bob Martin

kiu ne sufiĉe rapide sin flankmetis

2

Li nomis Bill-on mensoganto.

Prof. G. Waringhien serĉas, de la " Malgranda Revuo " la n-rojn 3 kaj 4 de la tria jaro (1945) kaj 1 kaj 2 de la kvara jaro (1946) ; de la " Scienca Revuo " la n-rojn 3 (= 27 an) de la jaro 1955. Li pagos, laŭvole, per mono aŭ libroj.

William AULD

LA URBO DE TERURA NOKTO

James Thomson (1834-1882) estas skota poeto, kies reputacio estas samtempe firma kaj malpli universale akceptita, ol ĝi meritas. Preskaŭ ĉiu antologio enhavas ĉerpajon el lia majstroverko "La Urbo de Terura Nokto", tamen tre malmultaj poeziamantoj legas ĝin tutan. Oni povus eble iom satire pretendi, ke tio per si mem pruvas, ke ĝi estas majstroverko.

Poemo, por esti eterne valora, por meriti atenton, por pravigi sian ekziston, devas esti nepre unika, t.e., ĝi estu neimitebla, aŭ, se oni ĝin imitas (kaj fakte oni ĉiam vaste imitas la majstroverkojn), ĝi estu neatingebla, ĝi havu ian unu-fojon-por-ĉiam-econ. "La Urbo de Terura Nokto" estas absolute unika, almenaŭ en la kadro de la anglalingva literaturo kaj verŝajne ankaŭ en la mondliteraturo, kvankam kompreneble ne mankas parencaj poetoj kiel ekz. Leopardi kaj Baudelaire. Kaj tio, kio ĉefe donas al la poemo de Thomson ĝian unikan kvaliton, estas samtempe tio,

kio malhelpas pli vastan aprecon pri ĝi. Ĝi estas la sola grandioza kerne pesimisma poemo de la angla literaturo. Ĝi estas pesimisma kaj kontraŭreligia; kaj sekve ĝi forpelas legantojn, kiuj postulas nepran optimismon en sia legaĵo.

Al dogmemaj religianoj kompreneble la poemo estas verko severe malaprobinda, peka kontraŭ dio kaj la homa animo. Homoj, kiuj obstine rifuzas rigardi rekte la ombrajn flankojn de la vivo, protestas, ke ĝi estas malsana verko de fie nenormala mensi. Ke ili malpravas, pri tio Thomson mem donas al ni la ŝlosilon: "Ke ĉi tiu verko estas vera rilate la aŭtoron, ke ĝi estas malfalsa, mi ne dubas, ĉar la kompatindulo tre kapablis esti malgaja. Sed ĉu ĝi estas vera rilate la mondon kaj la ĝeneralan vivon? Mi opinias, ke ĝi estas vera, sed ne la tuta vero. Ekzistas vero de vintro kaj nigra nokto, ekzistas vero de somero kaj hela tagmezo; sur unu flanko de la granda medalo estas stampitaj la gloro kaj triumfo de la vivo, sur

la dua flanko estas stampitaj la gloro kaj triumfo de la morto; sed kiu estas la fronto kaj kiu la malfronto, neniu el ni certe scias."

Preskaŭ ĉiu normala homo konas en sia memo ambaŭ flankojn de la medalo. Humoroj melankoliaj kaj gajaj, pesimisma kaj optimisma, alternas en ĉiu animo, ofte de tago al tago, kaj certe ne estas mirinde, se ni instinkte klopodas forgesi la ombrajn momentojn kaj turnas nin al la lumo, rigardante ĝin la vera aŭ "reala" flanko. Sed malagnosko pri fenomeno ne detruas ĝin; la melankolio ekzistas — ne povas malekzisti, se ni konstatas, ke nenio povas ekzisti sen sia komplemento — kaj neniu serioza pensanto atingos komprenon pri la mondo, pri la vivo, pri si, se li forrifuzas tutan gamon de la homaj spertoj.

La ĉefa valoro de "La Urbo de Terura Nokto", sekve, troviĝas en ĝia seninterrompa melankolio. Melankolio estas ofta fenomeno ĉe verkistoj. Pri tio skribis Thomson: "La nokta flanko de la naturo fariĝas literatura temo pli ofte ol la taga flanko, simple ĉar la literaturo ku-

time estas azilo por homoj malĝojaj; mi parolas pri malfalsa, pensoza, serioza literaturo, pri literaturo kiel celo en kaj por si, ne nur kiel amilo per kiu oni batalas, varo, kiun oni vendas, aŭ lukso, kiun oni ĝuas. Homoj ĝojaj malofte verkas por verki; la vivado plene okupas ilin. "Sed ĝenerale la verkistoj verkas reage kontraŭ sia spleno; la melankolio estas subtonaj motivo kaj impulso en iliaj verkoj, kiun ili penas venki. Thomson estas escepto; li sin donis al la melankolio, kaj ĝi obsede regis lin. Kompreneble, li sciis ankaŭ ridi. Li havis humorojn "normale" gajajn, kaj eĉ kelkaj el liaj versaĵoj estas senpere gajanimaj. Sed erare, laŭ mi, oni interesigas pri tiuj momentoj, ĉar tiu lia flanko neniom koncernas lian "La Urbo de Terura Nokto" — la sola poemo lia, kiu estas eterne valida. Nia ĉefa koncerno estas, finfine, ne la poeto sed lia poemo.

Rilate la kontraŭreligian aspekton de lia filozofio kaj lia verko, estas evidente, ke eĉ por rigore dogmemaj religianoj li devus roli tiun **advocatus diaboli**, al kiu en romkatolikaj rondoj, ekzemple, estas permesate prezenti

la kontraŭan argumenton. Oni almenaŭ konu kaj, se eble, komprenu la vidpunkton de tiuj seriozuloj, kies konkludojn oni ne povas akcepti. Sed verŝajne estas senŝance pledi pri tolero ĉe ortodoksuloj de iu ajn speco. Ortodoksuloj, akceptinte unu fojon por ĉiam ian dogmaron, ne plu interesiĝas pri alternativoj. Al homoj, kiuj studas religiojn kaj filozofiojn, ne por trovi, kiu el ili estas vera, sed por trovi, kiom en ili estas vera, la poemo de Thomson estas netakseble valora. Tro multaj personoj tro timas eĉ agnoski, ke la ateismo ekzistas, kaj ili ne volas rekonii, ke ateismo kaj agnostikiŝmo ne nur ekzistas sed estas, ankaŭ kaj eble precipe en rondoj plej inteligentaj kaj kleraj, tre disvastigitaj. Oni ne povas aprobi sintenon, kiu, atinginte konkludojn, ne agnoskas duonon de la haveblaj faktoj, kaj rifuzas vidi realan fenomenon.

★

Thomson estas poeto, kiu apartenas pli al posta ol al sia propra epoko. Estas popola kliŝo, ke la poetoj "famiĝas nur post sia morto". Tiu

kliŝo trosimpligas la aferon, ĉar kompreneble preskaŭ ĉiuj gravaj poetoj estis dece ŝatataj dum sia vivo ; sed fakte la ĉefpoeto estas ankaŭ kvazaŭ aŭguro (*). Li perceptas en sia medio naskiĝantajn tendencojn kaj ekŝanĝiĝojn, kiuj sentigos sin al la ĝenerala konscio nur en iom poste sekvonta generacio. Tiel frue kaj preskaŭ anticipe rimarkinte la direkton de la irota vojo, li ne estas plene komprenata de siaj malpli perceptemaj samtempuloj. Poeto, al kiu mankas tiu aŭgura kvalito, kaj kiu pli senpere parolis por sia generacio, tre ofte perdas iom el sia reputacio post sia morto kaj eĉ, en ekstremaj kazoj, fariĝas forgesita. La voĉo de Thomson ŝajnis al liaj samtempuloj voĉo freneza kaj malsana ; sed al vastaj tavoloj de la nunjarcenta popolo ĝi vekas reeĥojn en la animo. Ĉu iu ajn hodiaŭa poeto pli trafe reliefiĝis la malesperon de nia jarcento, ol Thomson per jenaj strofoj ? :

(*) E. v. atenti, ke mi diras "aŭguro" kaj NE aŭguristo. La diferenco estas grava en la kunteksto.

*Cu eble niajn disajn solfigurojn
Povus kunligi ia cel' komuna? —
Mi vidis unuopajn silentulojn
Sin sekvi en spaliro serpentuma
Tra l' kort' arkada de la katedralo
Kaj malaperi en la luna palo.*

*Sekvi la lastvenintajn mi do volis ;
Sub la portik' figura staris garde,
Kiu al ĉiu eniront' parolis,
Dum sub kapuĉ' okuloj brulis arde :
De kie en la mondo luma, viva,
Vi venas al ĉi Urbo Noktmasiva ? —*

*Mi pledis en senato antaŭ lordoj
Pri simpla justo por sennombraj hordoj
Malsate sklavaj sen homrajt' normala :
Mi elreviĝas en ĉi nokt' reala.*

*Vagadis mi tra multa sceno splena
De opiaĵoj, kun anim' serena
Kaj intelekto mirindege klara :
Mi elreviĝas en ĉi nokt' reala.*

*Mi igis centojn ridi pro plezuro
Per la senbrida viglo de l' humuro
Kaj klaŭna imitativo senrivala :
Mi elreviĝas en ĉi nokt' reala.*

*Preĝis kaj fastis mi en ĉel' izola,
Kaj sekvis ama, ĝoja kaj adora
Deliro de ekstazo senkompara :
Mi elreviĝas en ĉi nokt' reala.*

*Regadis mi sur reĝa tron' elita
Nacion, kiu floris per spirita,
Riĉa, potenca kresko jar-post-jara :
Mi elreviĝas en ĉi nokt' reala.*

*Al fid-ardantoj mi predikis rave
Safidon, kiu mortis animsave,
Kiu per sang' pekaron lavis pala :
Mi elreviĝas en ĉi nokt' reala.*

*Mi venendrinkis en taverno aĉa,
 Ĉe strasvirinoj, virtumult' apaĉa,
 Rida, kverela, sakra kaj batala :
 Mi elheviĝas en ĉi nokt' reala.*

*Senmanke bele bildis mi en pentro
 Edenon kaj gepatrojn de l' homgento ;
 Al ĉies vid' ekstazis lum' opala :
 Mi elheviĝas en ĉi nokt' reala.*

*Cespetkis mi laŭ pacienca plano,
 Pravigi ferojn de la Dia mano,
 Pruvi, ke velkas ĉio bonomala :
 Mi elheviĝas en ĉi nokt' reala.*

*Batalis mi, kun bando samcelana,
 Por liberigi de potenc' tirana
 La fratojn, malgraŭ malaprob' fratara :
 Mi elheviĝas en ĉi nokt' reala.*

*Tiel, ĉar petis la provos' insiste,
 Ĉu redonis signalvorton sian,
 Poste internen iris : miavice
 Eniris ankaŭ mi, doninte mian,
 Sed apudrestis ĝis paroloj ĉesis,
 kaj la pordegon oni fermis sukcesis.*

Ni devas konstati, ke al nia hodiaŭ mondo la strofoj de Thomson aplikigas kun frapanta efekto. Bedaŭri tion ni rajtas kaj eble devas, sed konfesi ilian fundamentan realecon ni ankaŭ devas. Se ni fortunigas nin naŭzite de liaj vortoj, ni fortunigas nin naŭzite de nia epoko ; sed tion fari ne rajtas iu ajn, kiu pretendas sinteni serioze al sia ekzisto. Ni rigardu la veron rekte en la vizaĝon ; se

ĝi naŭzas nin, ni serĉu rimedojn por kuraci ĝin. Eĉ Thomson, kies naturo ne permesis al li fidi kaj esperi, ĉiam starigis sin kun tiuj, kiuj volis reformi kaj plibonigi la socion. Li ne kredis pri progreso, li ne kredis, ke plibonigo estas ebla ; sed li malgraŭ tio sentis devon labori kun tiuj, kiuj kredis ilin eblaj, prefere ol lasi fali la manojn kaj nenion fari. Tia sinteno ne estas negativa,

ĝi ankaŭ ne estas malŝatinda. Homo, kiu malfidas sed tamen laboras, estas senfine pli valora kaj aprobinda ol homo, kiu fidas kaj nur atendas. Li estas eble, paradokse, la plej estiminda speco de idealisto. Se nur nia movado enhavus pli el la unua speco kaj malpli el la dua !

Dirinte tion, necesas, fine ĵeti rapidan rigardon sur la poemon mem. Ĉu ĝi sukcesas kiel artverko ? La poemo, laŭ

modernaj kriterioj, estas longa : ĝi enhavas 193 strofojn, sume 1123 versojn. Tamen ĝi havas maloftan integron. Ĉi estas verkita laŭ interesa kaj tre taŭga skemo : la rakonta fadeno, verkita per diversaj kaj laŭ la enhavo elektitaj strofoformoj, alterniĝas kun medita, priskriba kaj filozofia fadeno, kiu esprimiĝas per majesta kaj senŝanĝa strofo, de kiu mi jen citas ekzemplon el la komenco de la poemo :

*La urbo estas nokta ; eble morta,
 Sed nokta nepre, ĉar la spir' parfuma
 De la maten' ne povas veni ĵorta
 Post frida grizo de aŭror' rosuna ;
 Kompat-malŝate lun' kaj steloj brilas ;
 Neniam suno tiun urbon iras,
 Ĉar ĝi solviĝas en la hel' tagluma.*

La poemo progrese atingas kvar apogojn, kies superba belo kaj majesta tono certigas, ke ĉiam unu el ili estas elektita por enmeto en la antologiojn. Ili estas : (1) la

komenca priskribo pri la urbo, el kiu mi ĵus citis ; (2) potenca lirika intermeto ; (3) la kerna parto, en kiu li pritraktas kaj apologias la ateismon jene :

*Ĉiuj atendis flegime ĝis l'evento
 Sen sono kaj sen movo, kvazaŭ same
 Damnaj kaj egocentraj dum atendo.
 Poste aŭdiĝis voĉ' solendeklamme,
 Kaj trafis nin el la pupitr' obskura
 Okuloparo senkompare brula :*

Netolerebla okulpar' konstanta,
Brula sub vastaj kaj fortikaj brovoj ;
Malantaŭ ili estis kapo granda ;
Kiel abioj klinas sin pro blovoj,
Sin klinis nia aro ombrovesta
Pro tiu voĉo bas-sonore trista :

" Melankoliaj fratoj, ve, ve, ve!
En ondoj baraktante sen arke'!
En Nokt' malsankta : "spektra vagularo !
Sensumajn jarojn jam el mia koro
Pro vi la sango fluis kvazaŭ ploro :
Ho ve, ve, ve, sen ĝojo kaj sen klaro !

Via mizero mian koron premas !
Doloras al mi via sort' ; mi tremas,
Fereas, ĉar pereas vi sen beno.
Konsolon serĉis mi profunde, alte,
Tra l' tuta vasta univers' senhalte,
Por via furioza malsereno.

Kaj nun finfine veron mi raportas ;
Atestas ĉio, kio vivas, mortas ;
Por vi, por ĉiuj, jen novaj' ĝojiga :
Neniu Di' ekzistas ; nin ne kreas
Nek turmentadas Di-demon' ; ni veas,
Sed ne pro gal' de Iu malamika...

Nenion post ĉi eta viv' ni spertas ;
Trankvilo sankta de la tombo certas ;
Vi dormos kaj ne estos rekonscia ;
Krom putra karno ni nenio estas :
La eroj dissolviĝas, kaj rekreskas
Je ter', aero, plantoj, hom' alia...

Ho, fratoj tristaj! via vivo kurtas ;
Post kelkaj jaroj liberiĝ' rezultas :
Ĉu ne elteni dum ĉi viv' spir-torda ?
Sed se ne indas ĝin plenumi role,
Se vi deziras, finu ĝin laŭvole
Sen plua timo pri vekig' postmorta. "

L'orgena vibro de la voĉ' resonis
Tra l' volbaj navoj ĝis silento treme ;
La ton' sopira, kiu ĝojproponis,
Teneris kaj malgajis rekvieme :
La aro ombra restis senparole,
Meditis tiun " finu ĝin laŭvole ".

Kaj, la kvara, lasta kaj eble plej belega apogeo de la poemo estas la fina parto, en kiu Thomson interpretas vorte la mondkonatan gravuraĵon " Melencolia " de Dürer.

La aludita lirika intermeto estas nerespondebla pruvo, tiel pri la lirika talento de Thomson, kiel pri tio, ke an-

kaŭ melankolio povas esti fonto de lirikismo. Mi esperas, ke ĝia obseda, terura, korŝira belo sentigos sin ankaŭ per mia traduko. En ĉi tiu parto la poeto aludas la tragikan eventon de sia vivo : la morto de sia amatino, post kiu kaj verŝajne pro kiu li por ĉiam profundigis en la melankolion :

... Dum tra l' dezert' mi venis, tiel estis ;
Dum tra l' dezert' mi venis : kuris transe
Sur ĉielnigro meteoroj lance ;
Je flamabismo la zenit' truiĝis,
Pro fulmoj la ŝiksita ter' skuiĝis ;
Je fajraj ondoj baŭmis tuta grundo,
Kaj nur nin ne englutis flaminundo :
Sed marŝis mi severe,
Sen tim' ĉar senespere.

Dum tra l' dezert' mi venis, tiel estis ;
Dum tra l' dezert' mi venis : jen aeris,
Sovaĝan marobordon mi preteris ;
Leviĝis ambaŭflanke klifo granda,
Tondris profunda tajd' sur vasto stranda,
Saŭmblanko bolis, gutoj disbloviĝis ;
Nuboj, stelar' kaj luno ektroviĝis :
Kaj marŝis mi severe,
Sen tim' ĉar senespere.

*Dum tra l' dezert' mi venis, tiel estis ;
Dum tra l' dezert' mi venis : sun' aŭroris
Maldekstre, kaj fendegon supersoris,
Kaj tie haltis, nigris post forbrulo :
Restis orbito sanga sen okulo ;
La luno tuj sudokcidenten falis
Kaj dekstre super klifoj rigidstaris :
Sed marŝis mi severe,
Sen tim' ĉar senespere.*

*Dum tra l' dezert' mi venis, tiel estis ;
Dum tra l' dezert' mi venis : forno lante
De l' dekstro venis, ruĝe lumportante ;
Virino, kiu ruĝan lampon portis,
Nudkape, nudpiede laŭmarbordis ;
Kiel grazie paŝis ĉi izola !
Ho kia belo en vizaĝ' angora !
Mi svenis ; ekespere
Tim' luktis nasksufere.*

*Dum tra l' dezert' mi venis, tiel estis ;
Dum tra l' dezert' mi venis : jen mi du :
Du memoj, kiuj ne kuniĝos plu ;
Senpove unu vidis kun kompreno
Sin kaj Palian, kiun sternis sveno ;
Kaj ŝi venadis sen devio stumbla
Inter ĉi luno, sun' kaj maro grumbla :
Dum venis ŝi prospere,
Frenezis mi timpere.*

*Dum tra l' dezert' mi venis, tiel estis ;
Dum tra l' dezert' mi venis : eĉ infero
Mildas kompare kun ĉi damna sfero ;
Sur ŝia brusto, nigra signo kriis,
La blankan robon nigra bend' traŝtruis ;
La lampo estis ŝia brula kor' ,
Kies sangeroj lante gutis for :
Ne estis plu mistere ;
Tim' ĉesis ekkolere.*

*Dum tra l' dezert' mi venis, tiel estis ;
Dum tra l' dezert' mi venis : marproksime
Min tie svenan ŝi apudis kline ;
Lampgutoj falis al la frunt' malvarma :
Si viŝis ilin per la haroj, larma ;
Si flustris flustron aman kaj kompatan ;
Si malatentis tajdon alpelatan :
Mi time kaj kolere
Proksimis mallibere.*

*Dum tra l' dezert' mi venis, tiel estis ;
Dum tra l' dezert' mi venis : kiam fluis
Ĝis tiu loko, kie ŝi genuis,
Si brakis mortan min, kaj ambaŭ pasis
Forflose, kaj ĉi aĉan min postlasis ;
Tium korbrulon maro ne ĉesigos,
Ne lavos frunton, paron ne malligos :
Amantojn mornmizere,
Sentime, senespere ;
Mi kion faras tere ?*

Se la angla literaturo en- Dante sen Paradizo kaj sen
havas poemon kompareblan, Purgatorio. Ne mirinde, ke li
mi ne konas ĝin. Thomson prefiksis al sia poemo la
estas ia Dante de Britujo, sed Dantean version :

Tra mi vi venas urbon de turmento.

Paf ! Ricevite !

Kelkaj legantoj rimarkigis al nia Redakcio, ke ĝia frazo, pĝ. 161 : " la sola originala versforma dramo iam verkita en nia lingvo estas tiu Ivan VI ", estas erara, ĉar en 1913 estis publikigita kaj prezentita en la Berna kaj Geneva Kongresoj la triakta lirika dramo de Ed. Privat, " Ginevra ". Ni do korektu : " la sola originala kvinakta kaj rimita tragedio, " kion cetere ni intencis diri, ĉar la verkon de Ed. Privat ni tamen konis !

Roger BERNARD

FUNEBRA PAROLADO PRI LA TRI KOBOLDOJ

(fino)

La tricentan kunvenon de trupo (la aliaj pigris verŝajne la "Tri Koboldoj", en junio pro la alproksimiĝanta somer-1955, celebris nur tri el nia varmo) :

La tria cento

(kantebla proksimume laŭ melodio : **Ho ! Tannenbaum**)

La tria cento, la tria cento,
Por ni jen pia sento !
Ĉar el elito ni nin plektis,
Kaj la plej bonajn nur elektis !
La tria cento, la tria cento...
Publiko ! kia sento !

Sub laŭra volbo, sub laŭra volbo,
Ne estas lok' por kolbo.
Ĉar tie paŝtas sin ĉevalo
Kun nom' Pegazo, tra l' konvalo.
Sub laŭra volbo, sub laŭra volbo,
Nin armas plum', ne kolbo !

Filistra feto, etburĝa feto,
Ne bridas nin korseto.
Ni estas ja de l' sprit' la fosto,
Kaj spitas kontraŭ proza frosto !
Por inda feto, por digna feto,
For la virin-korseto !

(Roger Bernard.)

Por la tria Cento

La Simbolo

En la Kobold-muzeo, pro l' ĵusa tria cento,
mi vagis tra relikvoj kun la komprena sento,
ke estos pli konvene, anstataŭ kronon plekti,
por nia festotago simbolon ja elekti.

Jen estis postrestajoj de la Pegazĉevalo
kaj restis sekigita Chaville-arbar-konvalo,
peceto de muslino, kalsonoj kaj korsetoj
kaj, en muze-bokaloj, kiom da povraj fetoj !
Sed ve ! la alkoholon Laurat' dum granda frosto
fortrinkis por... maltrinki ĝin ĉe lanterna fosto !

Kaj jen ! neklarigeble, tutsupre sub la volbo
de la Kobold-muzeo postrestis olda kolbo.
Tuj super ĝi konsekre mi piajn manojn plektis
kaj tiun oldan kolbon simbolo mi elektis

pro ĝia... Kolboldeco !

(Raymond Schwartz.)

Por la 300-a kunveno de la Koboldoj

Al Kobildejo nin malnova sento
pelis piede aŭ per ŝtalĉevaloj,
ĉar da kunvenoj la triobla cento
pleniĝis ĵus je l' tempo de l' konvaloj.

Pli belajn florojn volas mi elekti,
kiujn velkigus ne la varm' aŭ frosto,
por al vi, Majstro ! (*) indan kronon plekti
kaj famgirlandon najli je l' pordfosto.

Ĉar via Muz' neniam kulpis fetojn,
neniam ludis ŝi per murda kolbo,
sed ŝia bela sano primokas la korsetojn
kaj ŝia rid' libere eĥas sub drinkejvolbo !

(Gaston Waringhien.)

Dum mi firme tenas la pecojn, de sama aŭtoro, pri
plumon, kaj ĉar ankoraŭ printempo alijara, kiuj pecoj
legas kelkaj nelacigeblaj, mi ne trovis, mi absolute ne
ne povas rezisti la tenton komprenas kial, lokon en la
ĉi tie eternigi aliajn du kobildeja Ora Libro :

(*) La Majstro : de l' sprito, kompreneble !

Printempo

Prikanti la printempon... jen malfacila leĝ'
 Por mi, ĉar malabundas mi je poetaj varoj...
 Dum rimas la aliaj facile en brakseĝ',
 Mi devas kapti magrajn ideojn ĉe la haroj !
 Se estus mi pentristo, ne povrus la penik' ...
 Poeto... mi prefere mergiĝu en bieron,
 Ĉar ĝi ne estas frukto printempa, la persik' !
 Do kiel miaj versoj spegulus revan veron ?
 Liriko mia povras, kaj lamas miaj bildoj...
 Reziĝnas mi je laŭroj... Ho ve ! sur mia dom'
 Neniam pendos liro, ĉi Apolona ŝildo...
 Kaj min vi certe taksos plej kompatinda hom' !

Printempo, en diversaj lokoj...

Jen en Pariz' familiara bildo :
 Dum verdas laŭ natura leĝ'
 La arboj, homoj sub gastama ŝildo
 Trankvile trinkas en brakseĝ' ...
 En Bavaruĵ' jam ŝvitas sub la haroj
 La dik-nukuloj, jen la ver' ...
 Kaj tamen antaŭ la kolbasaj varoj
 Floradas ŝaŭmo de l' bier' ...
 Ĉe la pied' de l' Fujijama verkas hom'
 Per delikata silk' penika ...
 Je l' mont-dekliv' kaj ĉirkaŭ lia dom'
 Jen flor' ĉeriza kaj persika ...

(Roger Bernard.)

Antaŭ kelkaj monatoj, la prezentado konsistas ĉefe konstatinte (ĉu tro memfi- el kanzonoj verkitaj laŭ la de?) la jaman maturecon de okazajoj de l' ĉiutago : poli- la kamaradoj, unu el ni pro- tikaj, artistaj, sportaj, ktp. ponis, ke ni ekatiku la ak- Post kelkaj pli-malpli fuŝi- tualajajn kanzonojn, prenante taj provoj, jen du ekzemploj, denove kiel modelon la pari- kiuj montras kelkan pro- zajn kanzonistojn. Ĉe ĉi tiuj, greson.

La unua estas inspirita de do de Esperanto, foto flamiga,
 la foto de "Miss Esperan- kiel estas konstateble el la
 to" aperinta en la numero sekvo.
 de 16 - XII - 1955 de Herol-

Ĉiuj sekvantaj strofoj, krom unu,
 estas kanteblaj laŭ la muziko de :
 "Ah ! Mesdames, voilà du bon
 fromage..."

Enkonduko

Ni nun kantos per ĉi tiu kanto
 pri la ĉarmoj de Miss Esperanto,
 pri la brustpara harmoni'
 kaj aliaj partoj de l' anatomi' !

(Raymond Schwartz.)

1-a Kanto

Ĉu vi vidis en gazet' Heroldo
 La "Miss Esperanto" kun dekolto
 Tia, ke tuj forlasos mi
 Studon de la lingvo por l' anatomi' !
 Mi troviĝas jam en embaraso :
 Estas ŝia bankostum' kiraso...
 Por firma mia opini',
 Ek kaj tuj al ŝia land' Kaliforni' !
 Ĉis revido, karaj geamikoj !
 Mi min donos al scienc-praktikoj.
 Por ĝin elkoni kun perfekt',
 Longe mi etendos min sur la subjekt' !...
 Mi revenos nur post kelkaj jaroj
 Da studad' pri ĉiuj Miss-"remparoj".
 Revenos mi, post kompromis',
 Kun ne Esperanto-Miss, sed ido-miss !

(Roger Bernard.)

2-a Kanto

Kio estas ja Miss Esperanto?
Ĉu do nova id' de l' "Ido"-planto?
Sŝ! ho ne misesploru ĝin,
Ĉar ne temas pri ide' ... sed pri idin'.

Trovi "Miss"-ojn, jen la tikla modo,
Kiu flosas nun ĝis l' antipodo,
Eĉ tiel, ke ĉi nova tik'
Baldaŭ ŝajnos de la mondo la mistik'!

Amerikon trovis ja Kolombo.
Nu, la lando de l'atoma bombo
Malkovris ĵus kun elegant'
Sian Kolombinon en "Miss-Esperant"! "

Ja ni scias: de post peka pomo
La eraro estas ec' de l' homo;
La misoj multas sur la ter',
Jen do kial plena restas la mister'.

Sed pro tiu "Miss" ne misesperi,
Ke ni povos dank' al ŝi prosperi,
Ĉar tiu speco de diant'
Prave plej nomiĝus la "Miss Elspezant"."

(Jean Thierry.)

3-a Kanto

Apud ŝi mi tuj kun nova viglo
lernus ĉion pri la... gramatiklo,
la verboformojn en aktiv'
kaj eĉ ŝiajn formojn en super... lasciv'!

Mi ekzercus laŭ blindula modo
la legadon per la tuŝmetodo,
ĝis mi parkerus kun kontent'
la dek... seks-regulojn de la Fundament'!

(Raymond Schwartz.)

Fino

Jen finiĝis tiu ĉi kantiko
plena de humor' kaj erotiko,
kaj ni tutkore vokas: "Ĝis!"
Je honoro de la Esperanta Miss!

(Raymond Schwartz.)

(Ni esperu, ke ni ne havos
malfacilaĵojn kun la posedan-
to de tiu "Miss" Esperanto,
kiu poste montriĝis kiel Sin-
jorino, edzino de eble tre
severa edzo!)

Laŭ propono de nia amiko
Sylla CHAVES, nia brazila
poeto, kelkaj ekzerciĝis pri
tiu temo: "En Usono iuj
entreprenoj vendas nuntempe
terenojn sur... la LUNO".
Jen du specimenoj:

(laŭ la muziko de
"Ĉe la luno luno...")

Sur planedo Luno
Estas multa spac'.
Kaj kun oportuno
Jam de ĉi surfac'
Trusto pecojn vendas
Sur najbara sfer'.
Kiu pecon mendas,
Zorgu pri l' liver'!

Sed l' eterscienco
Jam promesas, ke
Lunvojaĝkomenco
Venos baldaŭ tre.
Dank' al ĉi vojaĝo
Eblis scii nun,
Ĉu estas vizaĝo
Aŭ postaj' la Lun'?

Eblis nun aliri
Multajn astrojn plu.
Nur sin lasi tiri
Tra la ĉielblu'.
Seksnormaluloj
Rekt' al Ur...anus'...
Sen pilolstimuloj
Mi tuj al Venus'!

Bartelmes - mortspuro
Iros en SAT-urn'...
Vojon al Merkuro?
Dekstren post vojturn'!
Vivu, mi do krios,
La astronaŭtik'!
Ĉiu nun ferios
Laŭ la luna tik'...

(Roger Bernard.)

Ve al ni, se sur la Lunplanedon
homa mano metos la piedon,
ĉar la unua sur la list'
certe estos l'impostajokolektist'!

Al la luno mankas firma bazo,
ĝi varias laŭ la luna fazo.:
plena, duona, preskaŭ nul
kaj eĉ nevidebla al la hom-okul'!

Ĉiuj havos — tion mi komprenas —
multan lokon, se la Luno plenas,
sed dum la lasta Lun-kvaron'
ĉiuj tuj platiĝos kiel makaron'!

Sekve lasu ĉi spekulacion!
Anstataŭe prenu koncesion
sur tiuj Lunoj sen vual',
kiuj rotacias ĉe la Plac' Pigalle.

(Raymond Schwartz.)

Tiel distris sin la Koboldoj.
Kvankam oni post 50 jaroj
certe ne trovos tiujn amuzaj-
ojn en priesperantaj anto-
logioj, tamen ili havas tiun
ĉi meriton, ke, ĵonglante pli-
malpli lerte per la vortoj, la
koboldaj kanzonistoj utiligis
ĉiujn eblecojn de Esperanto
por ĝin vivi same kiel
nacion lingvon. Vizitintoj de
la kabareto ne kontraŭdiros,
ĉu?



Kaj nun la mondo priploru
la dronon de la kompatindaj
Koboldoj!

Jean THIERRY

UNU INTERNACIA PROBLEMO : LA MORTIGISTO

El ĉiuj juraj problemoj pri
kiuj la Unuiĝintaj Nacioj plej
facile povus akordiĝi, la plej
simpla sendube estas la krima
demando. Ĉu jam ne ekzistas
iu internacia policorganizo
nomata "Interpol"? Ĉu vere
la homo, kiu mortigas alian,
kia ajn estas la nacieco de
la viktimo aŭ de la kulpulo
ne sammaniere atencas la
**Universalan Deklaracion pri la
Homrajtoj?**

La problemo efektive estas
des pli grava kaj interesa, ke
ĝi speciale aktualiĝas, kiel en
Francujo aparte pro la gaze-
tara kampanjo okaze de di-
versaj procesoj, interalie de
la "afero Dominici", tiel
ankaŭ ĝenerale tra la tuta
mondo pro la tro multaj kri-
moj instigitaj de pli-malpli
politikaj partioj. Cetere, ne
unufoje la mortigisto estas
konsiderata de internacia
vidpunkto. Jam preskaŭ en
la sama tempo, kiam aperis la
Internacia Lingvo, en 1889
fondiĝis "La Internacia Unio
de Punjuro", kiu estis mala-
peronta post la milito de
1914. Sed de post la 28a
de Marto 1924 ĉe la Pariza
Jura Fakultato, stariĝis "La

**Internacia Asocio de Punju-
ro"**, kiu principe celas estigi
komunan fronton kontraŭ la
krimo. Kaj certe ĉiuj povas
konsenti, ke la krimo estas
socia difekto, kies ofteco
ankoraŭ hodiaŭ restas troa
por mondo sin pretendanta
civilizita. Tial en Svislando
baldaŭ okazos sub la aŭspicio
de UNESKO la unua interna-
cia kongreso pri kriminala
juro.

En la lastatempa artikolo
titolita "Naivaj Diroj pri la
Mortpuno kaj la Vivrajtoj"
(1), S-ro Georges Fradier
plej trafe tuŝas la kernon
mem de la temo; kaj ĉi tiuj
"diroj", kiujn li deklaras
nur "naivaj", reale restari-
gas la juran punkton en
plenan lumon. Li ŝajnas en-
fermi la juristojn en unu al-
ternativo: la Universalna De-
klaracio de la Homrajtoj
asertas en sia artikolo 3:
"Ĉiu homo havas rajton je
vivo, libereco kaj persona
sekureco", kaj tamen mal-
graŭ tia rajto la juĝisto iafoje
kondamnas homon al morto.

(1) Vidu "la Kuriero", eldoni-
tan de UNESKO (N° 10, 1954).

Ĉu ne estas en tio ia kontraŭeco?

Certe ne la unuan fojon oni pridemandas la paveccon de la mortpunon.

Jam de longe oni ĝin diskutis: Richelieu en la XVIIa jarcento, Beccaria en la XVIIIa, la plej famaj teroristoj de la Franca Revolucio Marat kaj Robespierre fervore sin deklaris kontraŭ la mortpuno. Sed ni povas tuj rimarki mirindan kontraŭecon: Richelieu kaj la teroristoj uzadis mem plejmulte la mortpunon. Kaj fakte, tiu mortpuno, forigita en 1879 en Svislando, estas nun restarigita en deko da tiulandaj kantonoj.

Cetere ĝis nun la motivoj por tia forigo rilatis al konceptoj pli religiaj aŭ filozofiaj, ol propre juraj. Ili estas resumeblaj jene:

1° la socio ne povas rajti puni mortigon per io, kio estas ĝuste nur simpla mortigo;

2° la mortpuno restas senefika, ĉar eĉ la plej gravaj kulpuloj afektas ĝin spiti (almenaŭ laŭdire);

3° la morto ne respondas al la kondiĉoj de bona puno, ĉar ĝi estas nek riparebla

nek dividebla.

Sed, de kiam la Unuiĝintaj Nacioj subskribis la Universalan Deklaracion pri la Homrajtoj, la problemo povas nun stariĝi sur ia kampo multe pli jura.

Tuj de kiam li estas kaptata, konsideras S-ro Fradier, la plej sovaĝa bandito ne plu estas "eksterleĝulo", ĉar li estas juĝota laŭ la principoj de la leĝo; kaj ĉar la "talionpuno" (2) kaj la "sangprezo" aspektas nun nepre barbaraj, ĉi tiuj principoj ne povas esti aliaj, ol tiuj mem de la Homrajtoj. Nu: "la verdikto falas sur la kulpon, sed la kondamno koncernas la homon. Tial estas ne certe, ke oni povos trudi silenton al tiu homo, se li preparolos sian rajton je vivo. Se li malakoros la Universalan Deklaracion kaj sin rekonos kulpa, li diros: ĉi tiu listo da rajtoj, el kiuj mi spitis la plej gravajn, neniel senpezigas la respondecon mian. Sed ĝi ankaŭ ne forigas la vian. Ĉi ne permesas, ke mi vin forlogu al la mallumoj, en kiujn mi falis... Mi legas: **ĉiu homo rajtas la vivon,**

(2) " Okulo por okulo, dento por dento ".

kaj ĉi tiuj paroloj premeblas min. Nun estas via vico por legi..."

Tiamaniere ligiĝas do ia nova Gordia jura nodo.

Evidente oni povus ĝin tranĉi tuj, rifuzante ĉian ajn juran valoron al la Deklaracio; sed la intereso de la demando postulas, ke oni ĝin akceptu, almenaŭ provizore, kiel postulaton. En tia hipotezo, oni estas kondukita al la konkludo, ke la pledo de S-ro Fradier nuligas la punrajton.

Efektive oni povas ĝin ĝeneraligi pri ĉiuj punoj: ĉu ne ĉiam ili rilatas al forigo aŭ interrompo de iuj rajtoj el la Deklaracio? Ili ĉiam atencas almenaŭ kontraŭ unu el ili. Sendube la mortpuno forigas la vivrajton; sed la dumtempaj aŭ vivdaŭraj punlaboro kaj punezilo, la tenado en malliberejo aŭ en ŝlosigo, la elpelo aŭ degrado, kaj eĉ la punoj nek korpaj nek fifamigaj, kiel ekzemple la mallonga enkarcerigo, la monpuno aŭ la konfisko, ankaŭ pli-malpli tuŝas la liberrajton. Fakte ĉiuj punoj atencas la Homrajtojn, ĉar el la difino mem ili devas esti almenaŭ ia ĝeno por la kondamnito; kaj sekve de tia

rezonado ne plu unu puno ŝajnas ankoraŭ ebla!

Sed en tiu okazo, kiel do respektigi la Homrajtojn mem? En tio kuŝas la vera problemo.

La juro diferencas kaj de la religiaj kaj de la filozofiaj konceptoj precipe pro tio, ke ĝi supozigas realan sankcion, precipe pro tio ke ĝi nepre postulas tian punrajton. Forigu la sankcion, kaj plu ne estos juro; forigu la juron, kaj plu ne estos socio: tiam regos nur anarkio aŭ la volo de la plej forta.

Ĉu tio signifas, ke la juro estas ento? Ne, ĉar la juro

Kial vi mortigas min? — Nu, ĉu do vi ne loĝas trans la rivero? Mia amiko, se vi loĝas sur tiu ĉi flanko, mi estus murdisto, kaj estus neĵuste mortigi vin tiamaniere: sed ĉar vi loĝas sur la transa flanko, mi estas bravulo, kaj tio estas justa.

B. Pascal.

prezentas nur la iutempan sintezon de iu socia ordo. Ĉu tio signifas, ke la socia ordo estas ento? Ne pli prave, ĉar

ia socio estas kreaĵo de la homo : ĝi devenas de la homa naturo mem, kiu sociemas. Nur la homa esenco estas ento, aŭ per si mem, aŭ fare de la "Kreinto", laŭ la filozofia aŭ la religia vidpunktoj ; tial tute prave la fundamento de juro povas esti starigita sur la Homrajtoj.

Verfakte la argumentado de S-ro Fradier rezultas el jena premo : ĉar ne la socio mem donas vivrajton, sekve ĝi ne povas ĝin repreni. Sed tia premo ne respondas plene al la realo.

Kiu parolas pri ia rajto, tiu supozas juron, ĉar rajto nepriegas, ke ia juro agnosku kaj efektivigu ĝian protekton. Rajto sen protekto ne havas juran sencon. Temas nur pri bezono aŭ aspiro ; eble ĉi tiuj estas indaj je protekto kaj povas esti ĝi rajtoj ; sed nur socia ordo aŭ supera estulo, kiel Dio, povas igi ilin tiaj, donante al ili protekton. Ni ne devas konfuzi : doni ion kaj doni rajton al io. Ja socio ne donas la vivon nek la liberecon, sed ĝi donas la protekton al la vivo kaj al la libereco. Konsekvence, ĝi prave povas repreni la rajtojn, se ili estas misuzitaj.

Cetere, kiu atencis la vivrajton de alia homo, tiu fakte atencis same sian propran vivrajton : tiam, kiel diris la antikvaj Romanoj, li fariĝis "sacer" (latina vorto, kies religia kaj jura prasenco signifas : dediĉita al dioj), alivorte : ne plu protektata de la civitaj leĝoj. En la pratempo tiackaze iu ajn homo povis lin trakti laŭ sia volo, eĉ mortigi. La puno do ne estas alio ol, la efiko mem de la atenco : la forigo de la protekto.

Sekve, la mortigisto eĉ kaptita ne plu povas alvoki rajton, kiun li forigis ; ĉar li atencis la protekton al sia propra vivo kaj eĉ al la vivo de ĉiu el ni. Kaj la mortpuno,

*Forigi la mortpunon ?
Kial ne ? La sinjoroj murdistoj bonvolu komenci.*

A. Karr.

konsekvence de la ago ne ŝajnas rezulto, laŭ nia opinio, el propre dirita juro, sed nur el fakto. La juro intervenas nur kiel paciganto por koncedi laŭ la cirkonstancoj ankoraŭ ian protekton aŭ pardonon al la kulpulo. Kaj tia estas la pozitiva senco de puna

leĝo : indikante la punon, ĝi indikas la protekton de la ceteraj rajtoj. "La verdikto falas sur la kulpon, sed la kondamno koncernas la homon". Tamen ankaŭ la kulpeco koncernas la homon ; kaj se tiu ĉi ne devus elporti la sekvojn de siaj agoj, kion do povus signifi kulpo ?

Fakte, plibonigi la kulpuojn estas morala afero ; kaj, akcentante tiun vidpunkton, tro ofte oni perdas el la okuloj la celon de la juro, kies rolo estas esence respektigi la rajtojn.

La mortpuno ne devenas el

ia enta privilegio de la juro : ĝi estas nur la preventa aŭ efika fakto, kiu protektas la vivrajton mem ; ĝi ne kontraŭas al vivrajto, male ĝi reale ebligas ĝin, ĝi ja protektas ĝin.

La fama franca filmo "Ni ĉiuj estas mortigistoj" efektive malpravas. Ĝi kritikas la mortpunon pro juĝista eraro : sed tia eraro ne devenas de la ekzisto de la mortpuno, sed sole nur de la enketa proceduro. Jen la ekzameninda punkto. La jura celo kuŝas en socia protekto ; la cetero estas nur moralaj aŭ sentimentalaj konsideroj

Ebbe RODE

" Preskaŭ kvieto ĉe la fronto kaj nur malmultaj mortintoj."

... nur malmultaj mortintoj...

*Mi estis unu el ili —
el la "nur malmultaj"
pri kiuj vi legis.
Estis tiom pacplena
la telegramo,
memorigis pri
dimanĉa mateno
kun malmultaj promenantoj
kaj neniu trafiklumo —
aŭ pri nudaj kampoj,
kiujn vi traveturas,
nudaj kampoj*

iomete kovritaj per neĝo,
kaj kies radsulkoj
rigidiĝis pro la frosto,
kaj neniuj homoj
kaj neniuj bestoj
tiom vaste, kiom eblas vidi.

Vi kŭtimas legi
pri miloj
jes, centmiloj da mortintoj,
lial "nur malmultaj"
ŝajnas al vi kiel: neniuj.

SED MI ESTIS UNU EL ILI.

Mi ne scias ĉu la amasigita sufero
de miloj
estas pli granda ol la sufero de unu,
mi ne scias ĉu ĝi estas mezurebla.
MI ne pensis "nur" —
kvankam mi dum teruraj sekundoj
pensis "sola"
en tia maniero, kia mi nenian antaŭe imagus,
ke mi povu sperti.

Estis ĵus antaŭ forpermeso
— ho, la lastaj tagoj,
ilia ekscito,
umagu se nun, proksime al la fino io okazus,
kio malhelpus tion
— mi pensis pri paĉjo, panjo kaj —
ne, mi ne volas diri la nomon,
mi kredas, ke nur nomi ĝin,
eĉ, ĉi tie, post mia morto
povus krevigi mian koron pro sopirego.

Cu mi baldaŭ revidus ilin,
ĉirkaŭbrakus ilin,
aŭ ĉu mi —
je diabla hazardo —
mia militservo daŭris dek monatojn

tiun fojon,
kaj ĝi eĉ pasis sen plej eta akcidento —
Ĉu mi estis trafota
nun? Fariĝi invalido
aŭ eble morti?
Ho, Dio, ho Dio
ne permesu tion.
Lasu min veni hejmen.
Tiam ĝi okazis.
Mi estis sola,
mi transiris grandan kampon,
dum du tagoj ni ne aŭdis paŝadon.
Kurioze ke mi aŭdis la krakon
longe antaŭ ol mi estis trafata,
mi aŭdis, ĝin kaj ekhavis tempon pensi pri ĉio.
"Sola' mi pensis
"ĉi tie" kaj "paĉjo kaj panjo"
kaj "vi"
kaj "neniam trovebla"
kaj "eble putri"
kaj "neniu por doni la sciigon":
kiel kaj kiam"
kaj "neniam ekscii"
ke ili estas en miaj pensoj ĝis la fino —
do eble kredi, ke ili ne estis".

Kaj multe, multe pli mi pensis,
estis kvazaŭ ĉio, kion mi travivis,
preterpasus
per rapide ŝanĝantaj bildoj,
estis kvazaŭ tio, kion mi vidis
MEM plorus
pro senbrida, senjunda doloro,
pro turmenta plorplena, lamenta doloro,
kaj kiam la bildoj malaperis,
la pensoj trankviliĝis,
tiam ŝajnis, ke io lamentas malantaŭ
la griza ĉielo, en kiun mi rigardis.

Kaj tiam ekvenis la korpa doloro,

unue kaŭteriza,
poste estis, kvazaŭ ĉio brulus ;
mi klopodis ĉirkaŭrigardi,
mi apenaŭ ne kapablis moviĝi,
ne moviĝi ?
Ne, ne, ne ! kio do estas tio ?
Tiam mi vokis —
mi ree vokis —
mi vokis, mi kriis, mi kriegis,
post kelkaj minutoj da kriado
mi estis kvazaŭ elĉerpita,
Ĉu entute eliĝis sono ?
Ĉu kriis mia buŝo senbrue ?
Ho, Dio
senbrua krio pri helpo
en krepuskiĝanta dezerto,
grandega kiel la firmamento.
Ne, mi devis levi min
mi DEVIS.
Mi penadis,
sed ne kapablis ;
miaj gamboj estis kvazaŭ senvivaj. —
Tiam mi kuŝigis min —
La brulanta sento
mildiĝis
momenton —
mi klopodis pensi klare,
mia pozicio rilate al tiu de la kamaradoj :
La ebleco ke unu el ili
povus preterpasi,
jes, mi ekhavis malklaran ideon, ke post duona horo
estas efektiva ŝanco ;
mi volis ŝpari miajn fortojn
por kriado
ĝis tiam,
sed pensu nur, se iu preterpasus
post malmultaj minutoj,
ne kvindek paŝojn de tie

kaj mi TIAM ne krius,
aŭ imagu, ke mi ŝinkriegus
kaj ne krius, kiam ili estus tie.
Tiam novaj turmentoj komenciĝis,
mi frostis kaj ŝvitis samtempe,
mi sentis kvazaŭ mi estus varma
ie interne,
kvazaŭ ŝprucus sango el interna ŝirvundo.
Naŭzo
kaj malvarma ŝvito sur la frunto,
kaj dume
takte kun mia pulsado,
sonis en mia animo : " Paĉjo, panjo kaj vi "
kaj " neniam plu ".
Ĉu mi ŝinkriegu,
aŭ ĉu mi enterigu min mem,
provu arigi kelkajn frostiĝintajn
tertuberojn
super mi
por alporti varmon al la malsana loko.
Mi penadis turni min flanken
por klopodi fosi
— sango fluis el mia buŝo,
kaj la pozicio igis la doloron
en mia subventro
eĉ pli terura.

Ne, ne, ne, ne!!!
Tio ne povas esti la solvo
pri malkonsento inter homoj,
tio ne povas alporti la solvon,
vi devas trovi alian —
DEVAS.

La sekvantaj sekundoj
minutoj
kvaronhoroj
— mi ne scias —
por mi estis eterneco,

sojfo, freneza, krianta sopiro, mizero,
doloro kvazaŭ de internaj flamoj,
suprenlekantaj ĝis mia gorĝo,
kaj poste tio, kio estis pli malbona ol la mizero,
kiu ĝis nun estis sono por ĉio:

Ĝia kontrasto :

naŭzo, senutilo,

obtuza malpleno

kaj koaguliĝinta, ŝelora abomeno.

Poste la tuto

kaj ankoraŭ pli

en unu turniĝanta naŭza karuselo, |

bajonetoj, kiuj trapikis min,

kolboj, kiuj fendis min,

mueliloj, kiuj frakasis miajn ostojn,

fortoj, kiuj ŝetis min

tra miloj da senfundaj abismoj,

fajroj, kiuj brulis min ankoraŭ vivan.

Ne, ne plu —

io estu nerakontita.

Sentspire la priskribo

ĉesu.

Per la nediritaĵo

vi devas antaŭsentu

la plej altan teruron

kaj per la antaŭsento

VIDI.

Nun krustiĝas la sango ĉe mia buŝo.

" Nur ".

El la dana, kun la afabla permeso de
la aŭtoro trad. Gerda Thorstain.

Clelia Conterno GUGLIELMINETTI

RECENZO *

Marjorie Boulton : KONTRALTE. Eld. Stafeto, La Laguna
(Kanariaj Insuloj), 1955. Broŝ., prezo : fr. fr. 630

Mendebla ĉe la Nica Literatura Revuo

Kiam Profesoro Waringhien proponis al mi recenzon de tiu ĉi verko, mi pensis : jen la kutima angla verkisto en Esperanto, aŭ pli bone en Basic-Esperanto, ĉar nia lingvo fariĝis lastatempe tia en beletro, pro la anglismoj per kiuj florumas ĝin niaj anglaj poetoj. Kaj mi malbonvole prenis mian Little Oxford Dictionary, ilon necesan nuntempe por legi Esperantan literaturan tekston...

Sed mi ne bezonis ĝin. Ebnaj, belsonaj versoj, ne hirtaj je konsonantoj, ne stumbiligaj pro kunmetaĵoj, ne densaj je kunpremitaj konceptoj, kondukis min al konaĝo kun anim-romano ; ĉar pri romanoj temas, ne nur pri antologio de versaĵoj. En tiu romano, ĉefrolon ludas virino, ne plu tute juna sed ankoraŭ ne maljuna, kiu baraktas inter du personecoj ; la devi-

* Kun plezuro oni relegos, okaze de tiu recenzo la belan poemon de K. Kalocsay " Al Marjorie Boulton " aperintan en nia N^o 4 pĝ 123.

gata edukistino, kaj la vera, varmsenta amantino. Tiu ĉi virino, jam suferinte en sia frua aĝo pro neklara peza doloro (vidu p. 37, la unuan el " Amaraj sonetoj ", kiun famen mi ne kuraĝas akcepti laŭlitere), vivas sola, verkas, kaj direktas inan kolecion. Sed, kvankam ŝi tre amas sian laboron kaj siajn lernantinojn (ombro de patrineco estas en ŝia komprenemo, vidu en " Trista Tenereco " XVII, p. 25, kaj alie plurloke), ŝia vivo estas celserĉado. Ŝi trovas ĝin malfacila, kelkmomente t e d a (" Plendeto pri malgravaĵoj ", p. 98), kelkmomente malesperiga (" Preskribo " p. 82), plejofte doloriga, sed sub tiu ŝajna pesimismo ŝvelas tiom riĉa, tiom potenca vivdeziro, kaj ŝi estas esence konvinkita, ke vivi valoras la penojn (" Vivu ! ", p. 84, " Mia kredo ", p. 91). Tiu ĉi virino ankoraŭ ne tridekjara renkontas viron, la viron, kiu taŭgus por ŝi : kleran, al ŝi eble laŭ pozicio kaj menso

superan, honestan kaj fizike tre plaĉan. Sed la viro jam estas ligita : li havas edzinon, filinon. Kaj en la centro de la verko densiĝas historio pri tiu ĉi neeblo amo, en kiu la viro ŝajnas morale pli forta, kaj evitas al ŝi katastrofon, kompletan perdiĝon. Inter la du ĉefrolantoj restas amamika rilato spirita ; la ribelanta karno estas en ŝi preskaŭ dresita, kiel ŝaŭmanta sovaĝa ĉevalo ("La karna ĉevalo" p. 148, "Dresado" p. 149), kaj ŝi povas per pli trankvilaj okuloj rigardi ĉirkaŭ si la mondon eterne burĝonantan ; ŝi povas ("Personoj", p. 235-247) kulturi aliajn homrilatojn ; ŝi renkontas ankaŭ movadon, kiu interesas ŝin, la movadon pri internacia lingvo, kiu tuj iĝas ŝia preferata esprimilo. Kaj ŝia vivo daŭras, spite la fajron, kiu ŝin eterne konsumas en la korvulkano.

Jen kion trovos en la libro la legantoj, kiuj ŝatas romanojn.

Sed tiuj, kiuj ŝatas poezion, pli multon trovos. Ili trovos poeton : kio ne estas oftajo en Esperantujo. Ni abundas je versfarantoj, ĉar ĉe ni, ŝajne, fariĝis sistemo la sin-

dediĉo al io, pri kio oni fiaskis en ordinara vivo. Senvaloraĵaj amatoroj svarmas ĉe ni ; inter Esperantistoj veras, ho kiel veras, la proverbo "ĉe regno de blinduloj, regas unuokulaj". Mankas bonaj verkistoj, ni laŭdas la malbonajn ; mankas bonaj vortaristoj, arĥitekturistoj publikigas vortarĵojn (eĉ ilustritajn...) ; kaj nia literaturo plenas je balasto, kiun ni al kutimiĝis aplaŭdi, ĉar fanatikoj nin blindigas : ĉiu ajn skribaĵo estas bela por ni nur, ĉar ĝi estas en Esperanto.

Mi konfesas, ke ankaŭ pro tio mi malfermis kun kontraŭsento la libron de Marjorie Boulton, des pli post kiam mi legis la antaŭparolon de William Auld. Auld estas ja fidinda persono ; sed estas, kiel mi diris, tiom facile entuziasmiĝi blinde, se temas pri Esperanto... Sed mi estis konkerita de l'unua paĝo, tuj. En la unua parto de la libro, M. Boulton kolektas siajn impresojn kiel profesorino, kaj vidas sian profesion de originala, pure virina vidpunkto ; ĉar ankaŭ mi mem instruas al 14-16-jaraj knabinoj, mi trovis en ŝi fratinon pli junan, kaj kortuŝite legis la sonetojn, kiuj, per versoj ebenaj, faci-

laj, priskribas ŝiajn impresojn. Mi studis tiam la portreton de la aŭtorino : trankvila, okulvitra vizaĝo, sur fono de trankvilaj libroj. Ĉio en ĝi parolas pri trankvileco : la milda rideto, la plektitaj haroj sur alta frunto, la severa vesto. Mi daŭrigis la legadon. Jen fajro, jen lafo, jen bolanta kaldrono. Ŝi ne plu estas kara instruistino, ĉarme priskribanta siajn spertojn : ŝi estas pasia, arda, plensenta virino. Ĉiujn gamojn ŝi sonorigas. Jen sentebles voĉoj de antikvaj poetoj, plej alte Catullus (p. 38, "Kiom mi amis vin kaj vin malamis", memoru : "Odi et amo. Quare id faciam fortasse requiras..."), kaj, neatendite, Vergilius (eĥoj en "La ora branĉo", p. 176). kaj Dante ("Ni sidis kuŝe kaj tra legis libron...", p. 114), kaj, tre ofte, Petrarca. Mi ne scias, ĉu M. Boulton konas tiun ĉi italan poeton ĝisfunde : sed ŝia verkaro montras multajn similojn kun la stilo, la situacioj, eĉ la nebelaĵoj de la versoj de Petrarca. Tiel, fizika amo luktas kontraŭ spirita amo, devo kontraŭ aspiroj, karno kontraŭ animo, pro malpermesata idolo. Tiel, el tia baraktado naskiĝas

doloro, kontraŭstaroj vole maldolĉaj ; tiel, la aŭtorino amas sian suferon kaj volupte dronas en ĝi. Kaj ankoraŭ, voĉoj de naturo, aspektoj de lokoj kaj sezonoj estas kolorigilo de ŝia animstato, jen pro agordo, jen pro kontrasto. Kaj, kiel Petrarca, ŝi amas plaĉajn vort-ludojn, vort-kontraŭmetojn : ekz. p. 39, IV, "mi fidis nur je vi, kaj mi vin timis" ; p. 108, "arde reardaj en reflama flamo" ; p. 137, "mia kara, ne mia-sufiĉe sufiĉas" ; p. 169, "dolĉe amara" (kio estas plej pure Petrarca). Same kiel ĉe Petrarca, dum ŝia poezio ŝvebas alte, flugiloj mankas neatendite, kaj en serion de belegaj versoj jen falas obtuza, plata esprimo (p. 128, "ne perdu nun okulon aŭ orejon", tro madrigala ; p. 139, "kiel min skuas tiel faradize", se ne temas pri preseraro anst. "paradize" ; p. 147, "spino, skapolo kaj klaviklo" ; k.t.p.).

Ankaŭ Ovidius traaperas el ŝiaj versoj. Kelkaj tonoj de "Tristia" ; ia troa facileco al versigado de rezonaĵoj : por f-ino M. Boulton, kiel por Ovidius, "quidquid temptabam scribere versus erat" ("kaj

kion ajn mi skribis, estis verso"). Tio estas eble la nura serioza makulo en la verko de nia aŭtorino: ŝi estus devinta pli kuraĝe elekti, kaj forigi, el kelkaj tro longaj poemoj, manplenetojn da versoj, kiuj nenion aldonas al beleco aŭ emocio: ŝi kelkfoje pekas pro insisto ("Perdita", p. 121; "La ora branĉo" mem, p. 171, kaj kelkaj sonetoj el "Trista tenereco"). La plej mallongaj poemoj estas la plej belaj, ĉar, kiel belaj juveloj, kelkaj konceptoj ne bezonas pezan enkadrigon: vidu la trafajn, poluritajn gravurojn de "Bestoj kaj sezonoj".

Sed plej elstaraj karakterizoj de nia poetino estas ĉefe du: kuraĝa alfronto de novaj temoj, kuraĝa alfronto de novaj formoj. Tiel, vi vidas en "Retro", p. 59, la reenvolvajn de homa persono; kaj, en la belega "Infanoj nenaskotaj", p. 43, (laŭ mi, paragonebla al ĉefverkoj de ĉiutempa kaj ĉiulanda poemaro), la pensojn de sola virino; kaj, en "La floroj de pardono", p. 164, aŭdacan karesadon de viraj formoj: ĉi-rilate, kvankam M. Boulton parolas tre malfermate pri seksaj aferoj, nur malofte oni rifuzus versojn

tro klarajn (kiel "la ombra, strikta pordo de la vivo", p. 61: temas pri ŝia patriino!; "kaj mia brulo besta en ingveno", p. 115; "diru, ke nun utero - fluas per sang' amara", p. 47; kaj aliajn).

Rilate al formoj, kvankam por ŝi rimoj kaj ritma metriko ne havas sekretojn, dank' al ŝia perfekta estreco super la lingvo, ĝis ĝuo kaj ĝojo de kromrimoj kiel en «Plendeto pri malgravaĵoj», ŝi enkondukas plej feliĉe liberajn versojn, kiujn asonancoj aŭ ritmaj eĥoj tamen kunligas kaj revokas, en ĉiam perfekta ekvilibro de konscia arto. La sekreto de tiu ĉi kapablo estas verŝajne en la fakto, ke Marjorie Boulton estas jam profesia verkisto, ne esperantista amaturo. Kaj ni tiom bezonas profesiulojn, en ĉiu branĉo de nia aktiveco! Sed rimarkinde estas, ke tiu ĉi profesia verkisto elektis Esperanton kiel propran plej taŭgan ilon; kaj nur kiel ilon: nenian aludon al nia movado mi trovis, aŭ nur unu, ridetantan, p. 102: la verketoj pri Esperanta mondo, verdire nek multaj nek belaj, troviĝas ĉe la fino de la libro, ĉiuj kune. Efektive, kelkaj el la plej belaj versoj,

kiel la konciza, potence efika "Plumoj pluvaj oblikvas sur la stratoj", p. 204, aŭ la tuta "Paruo", p. 195, aŭ la kruda, sed belega "plorkrias, fekas kaj koleras", p. 44, aŭ "somero aŭtunas — ... finmortas pro la ado — de tiuj mortoj", p. 76-77, estas eblaj nur en Esperanto kaj tre malfacile tradukeblaj per naciaj lingvoj. Tio montras ankaŭ, ĝis kia grado nia aŭtorino posedas Esperanton, kiu fluas el ŝia plumo sen peno, sen pentoj, aldonante sian flekseblecon al la mirinda imago-riĉo de Marjorie Boulton: vidu la spasmajn de kelkaj versoj ("Nokta soleco", p. 119), la majestan plenecon de aliaj ("alte, kaj vastaj altoj superŝvebos, p. 31) la riĉecon malavaran de rimoj: "Stoke-on-Trent", sessilabaj versoj, "Sorĉo kontraŭ senespera deziro", kvar-silabaj! metrikan formoj, en kies kadroj estas malfacile sin movi: kaj kun kia svelta vigeleco ŝi laŭkuras tiujn versojn! Kaj dum mi parolas pri ŝia Esperanto, mi deziras akcenti, ke tiom ravajn rezultojn ŝi havis uzante preskaŭ nur la radikprovizon de Plena Vortaro; el ties Suplemento ŝi ĉerpis 22 vortojn; el la angla unu (loza), el latinaj

radikoj kvin. Ŝi deklaras, ke ŝi nek kreis nek emas krei novan vorton, kaj ni devas laŭdegi ŝin pro tio, en tempo kiam neologismoj svarmas en nian lingvon, kiu iĝas angla sub angla plumo, itala sub itala, franca sub franca, kaj Dio nin savu de eminenta Esperanto-verkisto ĉina! La rimarko, ke ĉiuj naciaj lingvoj havas poeziajn vortojn estas maltaŭga kovrilo: tiuj vortoj ja ne estas neologismoj, sed arĥaikaĵoj, kaj, almenaŭ en la itala, karakterizo de malbonaj versfarantoj.

Tiuj belegaj ecoj de la lingvo kaj stilo de M. Boulton tamen ne estus pli ol seka ligno, se ilin ne fajrigus, kiel mi jam akcentis, la vivanta flamo de ŝia personeco. Kaj tiu ĉi multifaceta personeco, rivelanta sin per la formulo "novaj kuraĝaj temoj en novaj kuraĝaj formoj", vere povas transpasi la limojn de Esperanta literaturo kaj doni al la mondo la grandan poetinon, kiu de Sapfo ne plu aperis.

Pro kritika devo, mi aldonas, ke "Kontralte" (io vira en la voĉo de tiu ĉi virino: ankaŭ Sapfo estis vokata "mascula Sappho", vira) aperis en bonega eldono, kun tre malmultaj preseraroj

kiujn mi listigas. P. 70, " **Hotondroŝtormoj, maroj, montoj**", ĉu ne mankas vorto? La aŭtorino ne kutimas indulgi al hipo- kaj hipermetraj versoj. P. 134, " **kaj estu peza, vakueco**", la komo troas. P. 139, " **faradize**" anst. " **paradize**"? Fakte, la aŭtorino ŝatas elektrajn paralelojn... P. 212, " **strangan**" anst. " **strangajn**". P. 219, eble " **fajfego**" anst. " **fajfilego**", alie oni havus hipermetraĵon. P. 130, " **min**" anst. " **mi**". Mi notas tiel detale, ĉar eble la libro havos pluajn eldonojn, ĉar ĝi meritas resti klasikaĵo en nia lingvo kaj eble ne nur en ĝi.

Kaj nun, adiaŭante — sed ne por ĉiam! mi ofte revenos al la paĝoj de "Kontralte" — adiaŭante Marjorie Boul-

ton kaj ŝian verkon, mi volus, de virino al virino, diri ion al la malgaje ridetantaj okuloj, kiuj rigardas min tra la okulvitroj el la fronta foto: "Marjorie, mi volus diri, mia pli juna fratino, forlasu tiun severan kombmanieron, forlasu tiun maljunigan vestaĵon, kompromisojn inter vi kaj vi: kaj, se la Feliĉo kun granda F ne estas permesata al vi, serĉu en la vivo feliĉeton: malgrandan, ĉiutagan, ordinaran feliĉeton; kun edzo, filetoj, hejmo; enradikiĝu; eble la feliĉeto valoros pli ol la Feliĉo, kiu ofte vidata de proksime, sin montras nur manpleno da rozkoloraj plumoj sen konsisto. Feliĉeto faros vin feliĉa. Kaj, se la mondo perdos kontraltan voĉon, ĝi akiros tiun sopranan de feliĉa virino."

Nur la senutileco de la unua diluvo malhelpas, ke Dio sendu al ni duan.
(Champfort.)

... Ke tiuj povraj infanoj vidas, kiel ĉio tio okazas, kaj ke ili kredas, ke morgaŭ tio iros pli bone,

Jen io miriga, kaj la plej granda mirindaĵo de Nia Graco,
Kaj mi miras mem pri ĝi, diras Dio.

(Ch. Péguy.)

La kuracisto, kiu zorgis pri Oskaro Wilde, vidinte, ke ties lasta horo alproksimiĝas, prezentis al li la kalkulon, kelke altan, de siaj honorarioj. La verkisto ĝin trarigardis, kaj vespiris: "Mi mortas vere super miaj vivrimedoj."

LIBROJ AKIREBLAJ PERE DE « LA NICA LITERATURA REVUO »

Sendkostoĵ 10 %. Pageblaj : R. Fiquet Poŝta Konto 2259-98, Marseille

Eldonejo « Stafeto » Régulo Pérez.	
La bapto de Caro Wladimir , de K. H. Borovski, trad. T. Pumpr. 22 x 16 - 144 p. ilustrita	fr. 525
El la maniko , originala novelaro de Reto Rossetti, 22 x 16 224 p.	fr. 630
Koko krias jam! originala novelaro de Ferenc Szilagyi 22 x 16 - 232 p.	fr. 630
Kontralte , originala poemaro de Marjorie Boulton, 22 x 16 - 286 p.	fr. 630
Eseoj , Unua volumo : Beletro, de G. Waringhien, 22 x 16 - 232 p.	fr. 630
La Infano Raso , Originala poemo de William Auld, 22 x 16 - 104 p. ilustrita	fr. 630
Eldono Luis Hernandez.	
La Malprudenta Scivolulo , Novela el « dan Kifoto », Trad. Luis Hernandez. 20 x 14 - 68 p. ilustrita	fr. 240
Eldonejo « Polonia ».	
Adam Mickiewicz , de Mieczylaw Jastrum, 21 x 15, 80 p. ilustrita	fr. 280
Sinjoro Tadeo , de Adam Mickiewicz, en traduko de Antoni Grabowski, 21 x 15 - 334 p. ilustrita kaj bindita	fr. 530
« Eldona Societo » en Stockholmo.	
Konscienco riproĉas , de Strindberg	fr. 75
Sveda Novelaro , trad. F. Szylagyi	fr. 450
Sveda Poemaro , trad. M. Carlsson	fr. 450
Sveda Antologio , broŝurita	fr. 1.100
Sveda Antologio , bindita	fr. 1.500
La Ringo de la Generalo , S. Lagerlöf	fr. 210
La Fino , Folke Bernadotte	fr. 210
Gösta Berling , S. Lagerlöf	fr. 1.100
Ekspedicio Kon-Tiki , T. Heyerdahl	fr. 1.250
La Normandaj Rakontoj , Maupassant, trad. R. Dupuis	fr. 1.100
Eldonejo « Komuna Konversacia Klubo » en Kopenhago.	
Rozoj kaj Urtikoj , de Paul Thorsen, ilustrita kaj bindita	fr. 530
Exopa Saĝo , de K. Kalocsay, ilustrita kaj bindita	fr. 455
Eldono : Esperantista Libro-Instituto, Brazilo.	
La Nigra Spartako , Originala rakonto de Géraldo Mattos 16 x 12 - 75 p.	fr. 110

REVUOJ ABONEBLAJ PERE DE « LA NICA LITERATURA REVUO »

Kontakto , Celje, Jugoslavujo	jare fr. 300
Norda-Prismo , Stokholmo, Svedujo	jare fr. 420
Prometeo , Osaka, Japanujo	jare fr. 300
Suda Stelo , Ljubljana, Jugoslavujo	jare fr. 350
Pollando , Varsovio, Pollando	jare fr. 1.800

NICA LITERATURA REVUO

Dumonata — 32 paĝa — formato 0,185 X 0,135
Abonprezo : fr. 400 — U.S. dol. 1,25 — Angl. ŝil. 8 —
sv. kr. 6 — aŭ egalvaloro.

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet. Poŝta konto 2259-98 Marseille.
en Brazilo : Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. Caixa
postal 881, Rio de Janeiro.
en Bulgarujo : S-ro Stojan Ĉuĝev, 13 str. Parĉevič, Sofio.
en Ĉeĥoslovakujo : S-ro Jaroslav Šustr, Dlouha 10, Praha.
en Hungarujo : S-ro D-ro Balint Szemeyei, huba-u, 38, Oroshaza.
en Japanujo : Prometeo, Nakatu-hamadōri 2-20, Ooyodo-ku, Osaka.
en Jugoslavujo : S-ro Josip Vajdlih, Podolje 15, Zagreb VI.
en Kanariaj Insuloj : S-ro J. Régulo Pérez, Apartado 25, la Laguna,
Tenerife.
en Pollando : Związek Esperantystow w Polsce, Kozia 3, Warszawa.
en Svedujo : Norda Prismo, Barnhusgatan 8, Stockholm.
en U.R.S.S. : S-ro J. Aoves, poŝtkesto 1.004, Esperanto, Moskvo.
kaj ĉiuj ĉefdelegitoj kaj landaj perantoj de U. E. A.

la luksa, ilustrita gazeto

POLLANDO

40 x 30 — 32 p.
tute en Esperanto

Artikoloj pri aktualaĵoj,
artoj, sciencoj, sportoj.

Multaj koloraj bildoj
jare fr. fr. 1.800

Ni peras por abonoj.

SENNACIULO

Monata organo de S.A.T.
8 paĝoj en formato 25 x 32
Jarabono : fr. fr. 525
1,50 U.S. dol.

Sin turni al :

Sennacieca Asocio Tutmonda
67, Av. Gambetta, Paris (20^e)

Le gérant : R. Fiquet, Nice

NORDA PRISMO

El Stokholmo

Redaktoro :

D-ro Ferenc Szilagyi

Petu senpagan specimenon

Abonprezo : 6.- sv. kr.
15 int. rpk. : 1,20 U.S. dol.
fr. fr. 420

Ni peras por abonoj.

La nova japana revuo

PROMETEO

Nakatu-hamadōri 2-20,
Ooydo-ku, Osaka, Japon
Trimonata sendependa gazeto
21 x 15 - 32 paĝa
jare fr. fr. 300.
Ni peras por abonoj.

IMPRIMERIE CIARABELLI
15, rue de L'Escarène - NICE